

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando

Esperantobladet

Marraskuu ♦ Novembro

5/1999

Syyspäivät saaristossa, s. 6



Muzikgastoj el Katalunio, p. 11
Blinduloj kongresis en UK, p. 21
Balona poŝto, p. 24

Esperantolehti

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; (050) 5829 248; työ/laboro: (03) 249 4313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Jukka Pietiläinen*

Nyyrikintie 4 H 47, 33540 Tampere. ☎ (03) 261 7871 ✉ jukka.pietilainen@esperanto.fi

Sekretario/Sihtööri: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Ali-Simola, Friskinkatu 2 A 33, 20360 Turku. ☎ (02) 238 7767

Kimmo Hakala, 72300 Vesanto. ☎ (017) 648 831 ✉ khakalat@nettilinja.fi

Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609

Anna Ritamäki, Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ aritamak@ra.abo.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Jussi Jäntti, Huuhankatu 14 B 8, 70600 Kuopio. ☎ (0400) 859 641

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Officejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Pli da aranĝoj – pli da publikeco

Informado estas unu el la kernaj agadkampo de ĉiu organizo. La bezonataj manieroj, iloj kaj rimedoj multe varias depende de pluraj faktoroj kaj tiel estas necese scii kion oni informu, al kiuj oni informu, kiam kaj kiel oni tion faru. Kompreneble ĉiam oni devas konsideri la homfortojn kaj rimedojn, kiujn oni povas uzi. Por ĉiu organizo devus tamen esti klare KIAL oni informu.

Unu maniero informi pri si estas videbli, havi aranĝojn, kiujn la celitaj homoj rimarku. Se oni sukcesas vekti la intereson de amaskomunikiloj, tiam jam grava sojlo estas transpaŝita. Oni povas vekti la intereson de publikaj komunikiloj per pluraj manieroj. Plej facile oni rimarkas negativajn agojn, kio estas bedaŭrinda, sed neevitebla fakto. Ni ja scias, ke militoj, krimoj, katastrofoj kaj akcidentoj ĉiam estas vaste kaj rapide raportataj. Tio tamen ne igu nin plani krimon aŭ revolucion por vekti intereson.

Veki pozitivan intereson postulas pli da laboro kaj cerbumado por agi ĝustatempe kaj ĝustamaniere. Pluraj el ni havas spertojn ekz. pri intervjuoj kaj artikoloj pri ili. Ni scias, ke estas grave antaŭe scii, kian imagon ni volas doni pri ni mem. Aliflanke estas ankaŭ grave, ke ni evitu agojn, kiuj povus vekti intereson en negativa senco. Citante malnov-

an ŝercon ni pensu kion ni diras por ke ni ne hazarde diru kion ni pensas.

Ĉi-jare okazis jam pluraj aranĝoj, kiuj signifis okazon videbli por la granda publiko. Pliaj aranĝoj okazos ankoraŭ ĉi-jare kaj venontjare. Mi nur volas menci ekz. la turneon de "Du Gitaroj", Muelifeston en Taivalkoski, Koboldan seminario en Iisalmi kaj pri la venontaj koncerton de Ĵomart kaj Nataŝa decembre kaj Kulturan Esperanto-Festivalon en la venonta somero. Esperanto videblis vaste ankaŭ dum la inaŭguro de la monumento pri Joel Vilkki en Somero.

Por pli bone aranĝi la informadon pri Esperanto en Finnlando konsiderante kaj la tutlandan kaj la lokan vidpunkton, la estraro de EAF decidis elpaŝi praktike dum la proksimaj monatoj. Tiel ni laŭ mia opinio finfine sukcesos pritrakti ĉiujn punktojn menciitajn en Kampanjo 2000.

Aŭtuno ĉiam estas tempo por komencio novan per refreŝiĝintaj fortoj kaj pensoj kaj per nova energio. Mia plej bona deziro estas, ke la agado por Esperanto en nia lando okazu en harmonia, pozitiva, inspira kaj ĝoja etoso.

Ni ĝoju pri, per kaj pro Esperanto.

Jukka Laaksonen

Al pli demokratia labordistribuo?

Jukka Laaksonen skribis en sia ĉefartikolo de Vekilo 3/99 pri societaj problemoj. Li diras, ke en malgranda societo tre malgranda nombro da aktivaj homoj faras ĉion. Tio estas eterna plendo inter ordinaraj esperantistoj. La laboroj akumuliĝas al samaj personoj, kaj la laboroj estas akumulitaj al ili. Volontulan laboron oni kun plezuro ŝarĝas sur la ŝultroj de malnombra aktivularo, kiuj montris siajn kompetencojn dum eĉ jardekojn daŭranta Esperanto-laboro. Ne estas granda diferenco inter movadoj esperantistaj kaj ne-esperantistaj. Tiajn labornarkotikulojn kaj heroojn pri laboro ekzistas en ĉiu organizo.

La problemo en tio estas, ke la potencon en la societoj havas ĝuste tiuj labornarkotikuloj. Demokratio malvastiĝas al manpleno de aktivuloj, kiuj jaron post jaro kaj jardekon post jardeko senplendante faras labo-

ron por Esperanto. Ĉar nia aktivularo kaj membraro estas liliputa en la socio finlanda, tiutipa ŝrumpado de potenco al unuopuloj estas fatala. Ofte oni pensas la labormetodojn estintajn kaj kiam oni devas ideigi ion novan la dum jardekoj laciĝinta aktivularo proponas nur jam maĉitajn ideojn.

Estas tasko de societaj prezidantoj distribui laboron kaj potencon demokratie. Estas malfacile diri al boneservintaj aktivuloj, ke la societo ne plu bezonas iliajn laborfortojn. Se iu havas ekstrajn fortojn, oni povas profiti ilin por bono de asocio. Je fortoj ni ĉiuj malsamas. Sed mi pensas, ke oni ne troŝarĝu samajn personojn fojon post fojo tiel, ke ili laciĝas. Ĉu ni volas pli da demokratio en niajn asociojn aŭ ĝis morto laciĝintajn kaj sub enorma laborŝarĝo plendantajn asociajn aktivulojn?

Aimo Rantanen

Uusi esperanto-oppikirja

Suomen Esperantoliitto on julkaissut suomeksi Lars Forsmanin alkeiskirjan "Egaleco kaj paco per Esperanto". Kirja on alkeiskursi yksinopiskelijoille, opintopiireille ja kouluille. Kirjan on ruotsinkielisestä alkuteoksesta soveltaen suomentanut Raita Pyhälä. Suomen Esperantoliitto kiittää Raitaa ja taiton viimeistelystä vastannutta Veli Hämäläistä sekä heitä avustaneita henkilöitä arvokkaasta työstä esperanton opetuksen hyväksi.

Oppikirjaa voi tilata Suomen Esperantoliiton toimistosta, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh. (09) 715538 (päivystys tiistaisin klo 17-19). Kirjan hinta on 50 mk + postikulut, tukuttain 10 kpl / 400 mk.

Oppikirjaa voi tilata Suomen Esperantoliiton toimistosta, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh. (09) 715538 (päivystys tiistaisin klo 17-19). Kirjan hinta on 50 mk + postikulut, tukuttain 10 kpl / 400 mk.

Nova lernolibro de Esperanto

Esperanto-lernolibro de Lars Forsman aperis. Raita Pyhälä adaptis ĝin por finnoj. La libro havas titolon: Egaleco kaj paco per Esperanto. Oni rekomendas ĝin por kome-

cantoj. Kostas 50 markojn ĉe la oficejo de EAF. Oficejo de EAF vendas ankaŭ po-grande, tiam 10 libroj kostas 400 markojn. Kontakto kun la sekretario Päivi Saarinen.

Kultura Esperanto-Festivalo

KEF-2000 en Helsinki

En sia kunsido la 21-an de aŭgusto la Organiza Komitato de KEF-2000 faris gravajn decidojn: La nova prezidanto de OK estas Riitta Hämäläinen kaj elektiĝis du vicprezidantoj: Sakari Kauppinen kaj Jukka Laaksonen, ĉefe por montri pli klare la subtenon de EAF kaj EKH al la festivalo.

Sekve de diversaj konsiloj ricevataj kaj por fari la aranĝon pli favorpreza por ĉiulandanoj la loko kaj datoj de KEF estis ŝanĝitaj tiel, ke ĝi okazos **17.-23.7.2000 en Kultura centro CAISA**, kiu situas meze de Helsinki, ĉe la strato Kaisaniemenkatu. (Cetere: eblos viziti la KEFejon jam la 11-an de decembro ĉijare, kiam Ĵomart kaj Nataŝa koncertos tie.)

KEF estos la plej granda kaj grava Esperanto-aranĝo en Finnlando post la 80-a Universala Kongreso en Tampere. Pluraj esperantistoj jam nun informis sian pretecon partopreni en la organizaj laboroj aŭ helpi dum la festivala semajno. Por fari la laboron pli

malpeza por unuopa helpanto estus des pli bone ju pli da helpantoj ni havus je nia dispono. En la 80-a UK partoprenis ĉ. 135 esperantistoj en diversaj laboroj kaj ni ĉiuj tiaj organizintoj scias, ke ni bone sukcesis. Nun kiam ni atendas 150-200 gastojn por kunfesti la **unuan tutmondan prezentadon de originala Esperanto-kulturo en la 2000-aj jaroj**, ni bone sukcesos kun pli malgranda helpantaro. Sed multeco de helpantoj ne estas malavantaĝo.

Do, se vi estos libera dum la festivala semajno (aŭ dum la prepara tempo) kaj pretas helpi en diversaj praktikaj laboroj, bv. informi vian pretecon al la sekretario de la Organiza Komitato, Tiina Oittinen (Puutarhaku 26 A 11, 20100 Turku, tel. (02) 2305 319, retpoŝto tiina.oittinen@orion.fi).

Rimarku ankaŭ, ke aĉeteblas belaj KEFaj t-ĉemizoj en la oficejo de EAF kaj dum diversaj aranĝoj.

Jyväskyläiset järjestävät kuljetuksen Ĵomartin ja Nataŝan konserttiin

Joulukuun 11. päivänä Kulttuurikeskus Caisassa järjestettävään konserttiin järjestetään kuljetus. Matkan hinta on Jyväskylästä 200 mk, Tampereelta 150 mk

ja Hämeenlinnasta 100 mk. Myös matkan varrelta voidaan ottaa ennalta sovitusti konserttimatkalaisia. Ilmoittautumiset Seija Kettuselle puh. (014) 254 609.

Suomen esperantoliiton Syyspäivät Turun saaristossa 4.–5.9.99

Järjestelyjensä ja säänkin puolesta tämänkertaiset Syyspäivät olivat täysosuma. Eriytyisen kiitoksen ansaitsee koko matkan ajan tapahtunut esperantonkielinen opastus.

Lauantaina 4.9 lähdimme Turusta kohti saaristoa. Tutustuimme Tuorlan tähtitorniin, joka sijaitsee nykyisen maatalousoppilaitoksen alueella. Tähtitornia esittelemään lupautunut turkulainen esperantisti ei päässytkään paikalle. Kemiöläinen Carola Antskog piti ex tempore -esittelyn, joka sai paljon kiitosta perinpohjaisuudestaan.

Kuusiston piispanlinnan raunioilla kuulimme, että juuri ennen Syyspäivämatkaamme alueelta oli löydetty keskiaikaisen



Urbanus-paavin sinetti arkeologisissa kaivauksissa. Turun alue on täynnä Suomen historian muistomerkkejä, olihan se ennen Helsinkiä 1100-luvulta saakka Suomen pääkaupunki.

Oletko kuullut suojellusta maisemasta? Taloja on kyllä tavallisesti suojelukohteena kaikkialla maassa. Turun lähellä on suojelukohteena laaja venevalkama-alue. Kävimme Paraisilla katsomassa kalkkikiven avolouhosta. Saaristokunnat ovat pieniä. Kuitenkin jokaisessa niistä on posti, skärgårdsbodan eli saaristolaispuoti, kirkko ja kunnantalo. Saaristo halutaan pitää asuttuna.

Eri saariin päästiin lautalla 'med färjan', niitä on saariston kiertotien varrella 8. Saariston ainoalaatuista luontoa halutaan suojella roskaamiselta. Ja tosi hyvin se on säilynytkin puhtaana. Saaristoon tulevat turistitkin ovat vastuullisia, eivätkä minkään massaturismin edustajia. Jokin saaristossa kuitenkin muistuttaa Lapista, luonnon kitukasvuisuus ja kapeat tiet.

Syyspäivät pidettiin Houtskarın saaristolaiskansanopistossa. Saaristossa ei harjoiteta mantereelta tuttua saunakulttuuria. Saunat ovat vaatimattomia. Kansanopiston saunasakin ainoa pesupaikka oli meri. Saaristolaisien sämpylät ovat kuin mantereen puolella vehnästä. Mustaa saaristolaisleipääkin saimme maistaa.

Iltaohjelmassa Jorma Ahomäki esitteli Tuorlan taikurin, Yrjö Väisälän, suuren suomalaisen tiedmiehen, fyysikon, geodeetin, optikon ja tähtitieteilijän sekä esperantistin.

Kuusiston piispanlinnan raunioilla.



Jokaisessa saariston kunnassa on oma kirkko ja kirkkolaiva.

Yrjö Väisälän työtoveri prof. Liisi Oterma oli esittänyt Syyspäiväväelle tervehdyksensä. Teoksesta “Yrjö Väisälä Tuorlan taikuri” (toim. Aimo Niemi, Fysiikan kustannus Oy, Tampere 1991, ISBN 951-96117-3-8) saa lähempää tietoa tästä tiedehistoriamme merkkihenkilöstä.

Suomalaisen musiikin iltaa veti Anja Karkiainen. Taas kuulumme uusia laulutekstikäännöksiä. Esperantolehti julkaisee tässä yhteydessä runon, jolla Anja Karkiainen voitti UEA:n Belartaj Konkursoj -kilpailun runosarjan. Tänä vuonna hän menestyi samassa kilpailussa laulutekstillään, jonka hän myös Syyspäivillä esitti. Mutta UEA:lla on oikeudet julkaista lauluteksti ensimmäisenä, joten lehden lukijat joutuvat hiukan odottamaan. Terhi ja Jukka Laaksonen esitivät illan lopuksi diakuvia Berliinin-matkalta.

Tuorlan tähtitorni.



Sunnuntaipäivän ohjelmasta huolehti saaristolaiskansanopiston rehtori Jan Gräsbäck, joka tuntuu tietävän kaiken saaristolaisten ns. allmoge- (rahvaan)veneistä. Rehtori on puolipäiväinen lautan kapteeni ja toisen puolen oppilaitoksen johtaja. Iltapäivällä kävimme tutustumassa valmisteilla olevaan saaristoveneeseen.

Rehtori valitti sitä, että viikinkien jälkeläiset ovat menettäneet veneidenrakentamisen kädentaidot. Ennen laiva valmistettiin talon pihalla ja kädentaidot opetettiin isältä pojalle. Nykyisin veneenrakennus on monivuotinen projekti.



Anna Ritamäki ja Carola Antskog esittelivät Kemiön murteeseen kuuluvia diftongeja, jotka tuovat mieleen muinaisskandinavian ja islannin kielen. *En* (eräs) on kemiön murteella *ein*, *heter* (olla nimeltään) on kemiöksi *heita* ja *sten* (kivi) on *stein*, islanniksi *en* on *einn* ja *sten steinn*. Puhuttiin myös standardisuomenruotsin ja esimerkiksi Pohjanmaan suomenruotsalaisten murteiden välisistä valtavan suurista eroista. Asiakkaan periaate, jota saaristossa noudatetaan, tuli myös esille. Sen mukaan asiakas määrää millä kielellä hän haluaa saada palvelua.

Anja Karkiainen esittelee Södergrania.

Saaristolaiskansanopistossa valmistetaan myös veneitä.

Turun saaristossa osataan suomea. Paikallinen varuskunta, turistit ja kouluopetus ovat tehneet saaristolaisista kaksikielisiä. Jokaisella kylällä on majstång, juhannussalko, niin oli Houtskarissakin. Saaristolaisia voi kutsua salkokansaksi.

Saaristo on aivan eri maata kuin manner-Suomi. Sääet olivat upeat. On vaikeaa ymmärtää miten vaikeaa elämä on saaristossa talvella, kun on nähnyt sen auringonpaisteisena.

AR



Anja Karkiainen
(vintre 1998)

I

Sorĉa hor' de kreiveco,
plumo, mi kaj paperpeco –
vortoj fluis, iĝis frazoj,
kunligiĝis al versaĵoj.

Ĉar mi ilin mem tre ŝatis,
mi kunulojn ne kompatis,
sed altrudis la liniojn
kaj postulis opiniojn.

Por preventi troflatemon
mi prezentis la poemon
anonima. Do respondis
ĉiu vere, dum mi sondis.

II

Fiŝisto hokkaptis starante sur bordo,
legis la versojn kaj diris: “En ordo,
kvankam mi pensas, ke ĝi iom sekas.
Kvazaŭ anas' la poeto nur blekas.
Pli eleganta ĝi estus laŭstile
se ĝi fluadus pli glite, angile.”

Ripareje bruis iloj, lubrikaĵo stinkis.
Laboriston la struktur' de l' verko ne konvinkis.
“Oni devus ĉiun parton tie ĉi disigi,
frezi, torni, rekunmeti kaj finreguligi.
La strofaro povus eble iĝi eĉ agrabla,
se ĝi estus polurata per papero sabla.”

Lernejana opini':
“Enuigas poezi'!
Nur konvenas la hobbio
al mumi' kaj fosilio.
Naŭzas ĉi galimati',
mankas tie eĉ bildstri'!

La vikari' de l' paroko loka
la verkon trovis skandala, ŝoka,
kaj predikadis tre fanatike:
“Nur povas iu malsana psike
tiaĵon skribi – aŭ hom' ebria.
La tuto estas diable fia!”

Ĝardenisto florbedeton sarkis
kaj leginte jenon nur rimarkis:
“Superflua, nenecesa verko,
tamen ĝi uzeblas kiel sterko!
Se mi lasus ĝin kompoŝte putri,
povus mi per ĝi legomojn nutri.”

Kiam mi al psikiatro deĵore
montris la strofojn, li ŝrikis angore:
“Kie vi trovis ĝin? Ĉu paciento
nun ĝin serĉadas je ve' kaj lamento?
Vidu angule la inkomakulon!
Per ĝi mi testos la skizoidulon!”

Bonodoris êe l' bakisto freŝa, varma pano.
Mian tekston li tralegis kun dolorrikano.
“Tro pufiĝis tiu êi nehomogena maso!
Ja malpli bezonus ĝi da gisto kaj da graso.
Mi konsilus al farinto, ke li ree knedu
aŭ prefere je plektad' de versoj tute cedu.”

Biologo ion studis per la mikroskopo.
Li konstatis: “Tio êi ne estas de Ezopo.
Ĉu ĝin kreis en ĝangalo cerkopiteketo
aŭ ĉu agonia muŝ' en aranea reto?
Eble naskis ĝin la kap' de pulo aŭ pediko.
Eê ne spuron havas ĝi de vera poetiko.”

Avertis kuracisto en urba hospitalo:
“Ĝi estas aktiviga al pankreat' kaj galo,
el kies stimulado rezultos misdigesto,
kaj poste doloregos stomako kaj intesto.
Neeviteble kreskos la arteria premo.
Signifas gravan riskon êi tia poememo.”

Sur herbej' pastiĝis brutoj kaj tabanoj zumis.
Tie miajn strofojn bienulo okulumis.
“Nur malgrandan parton de poemoj mi komprenas,
kaj el ili la plej dolĉajn arde abomenas.
Al êi tiu vortamaso mankas fram' kaj fosto.
Pli valoras produktaj' de sub la ŝafa vosto!”

Post tiu frapo mi pluenketis
êe pensiul', kiu mem poetis.
Li diris: “Kiam mi estis juna
ni ne verkaĉis en stilo nuna.
Ni noble, virte, profunde sentis
– sed tiun êi iu ekskrementis.”

La policano trafikon gvatis
kaj pro la strofoj la kapon gratis.
“Plej bone estus konfiski tion
– mi evitemas ja anarkion.
Do, la verkinto sin legitimu!
Mi malpermesos, ke li plu krimu.”

La kuiristo êe l' forno ŝvitis.
Pri la poem' li ne tro meditis.
“Al kiu povus la versoj plaĉi?
Almenaŭ min ili igas kraĉi.
Dolĉaĵon spicis la grandkanajlo
anstataŭ sukero kun sal' kaj ajlo.”

Eê sportisto stadione
ne premiis laŭrokrone.
Spiregante li nur veis:
“Kiu tiel flegme kreis?
Oni lin iele dopu
aŭ la klapon tute ŝtopu!”

III

Ĉu mi nun lasu la verkan laboron?
Ne, tute male! Mi sentas fervoron
libron poeti – en stilo sama.
Baldaŭ tutcerte ĝi faros min fama!
Verkojn malplaĉajn al granda publiko
trovas ja perloj klerula kritiko...

Gastoj el Katalunio

Mi intervjuis Joan Ràfols kaj Miguel Rodríguez antaŭ ilia koncerto en Urba preĝejo de Jyväskylä. Pri la 6-miliona kataluna popolo scias malmultaj finnoj. Katalunio naskis grandajn gefilojn, Salvador Dalí, Joan Miró, Gaudí, Montserrat Caball, kaj Paul Casals estas famaj artistoj el Katalunio.

Joan Ràfols diris, ke katalunoj volas Hispanion iĝi federacio. Tiam la problemo ekzemple kun Eŭskio ĉesus. En la periodo sub diktatoreco de Francisco Franco oni ne instruis la katalunan en lernejoj de Katalunio. Sed nuntempe ĝi estas instruata kiel la unua lingvo.

Kiam diktatoro Franco mortis en novembro 1975, ĉiuj katalunoj tostis per ĉampano por pli bona futuro. Katalunio kaj Eŭskio aŭtonomiĝis 18.12.79, do, antaŭ dudek jaroj. Nuntempe la katalunoj estas minoritato kiel la finnlandsvedoj en Finnlando.

Katalunio estas la nordorienta provinco en Hispanio. La katalunan oni parolas ankaŭ

en etŝtato Andoro. La kataluna havas parencon lingvon en Francio, la okcitanan. Katalunio havas longan historion. Dum jarcentoj kataluna kulturo travivis per farado de bonaj paktoj kun najbaroj.

La katalunaj muzikgastoj admiras la finnan lingvopolitikon. Ĝi estas bona ekzemplo por ĉiuj katalunoj. Kataluna parlamento proponis, ke ĉiuj produktaĵoj en Katalunio havu katalunlingvan enhavotekston.

La gastoj Joan Ràfols kaj Miguel Rodríguez estas muzikinstruistoj. Ili fondis gitarduon en novembro 1996. En Finnlando ĉi-somere ilian koncerton partoprenis sur multaj finnaj lokoj centoj da muzikamantoj, ne nur esperantistaj. En Jyväskylä la publiko konsistis el preskaŭ 90 personoj, multaj el ili estis studentoj en loka konservatorio. La duo ludis ankaŭ komponaĵon de Jyväskylä-ano, la komponisto Kai Nieminen. la komponaĵo estis bone ricevita.

AR



Fea seminario en Iisalmi

En Iisalmi 27.-28.8.1999 la dutaga internacia seminario pri koboldoj kaj feoj interplektiĝis kun la temo "La paseo en ni" dum la loka nokto de artoj. La seminarion partoprenis dekkvino da homoj el 5 landoj. Alia dekkvino, el Ganao, Kongo kaj Niĝerio, bedaŭrinde maltrafis la okazon.

La seminarion malfermis Reino Eriksson, rektoro de la Kultura Centro de Iisalmi. En mallonga koncerto estis aŭditaj pli malpli ekzotikaj instrumentoj, kiel arbfolioj kaj kranio de vivanta homo. Poste sekvis prelegoj pri koboldoj kaj feoj en diversaj eŭropaj kulturoj (ekz. la skandinavia, irlanda, franca, germana kaj nederlanda) kaj pri la

animisma tradicio de la afrika tribo *bamileke* en Kamerunio. Pri la ritoj de la tribo estis montrita ankaŭ kolora vidbendo kun muziko kaj dancado. Krome estis ekspozitaj lignaj kaj metalaj afrikaj maskoj.

Vespere la urbestro bonvenigis la seminarianojn per frandindaj manĝaĵetoj kaj trinkaĵoj en krepuska malnova urbodomo ĉe kandellumo. La ĉeestantoj longe interparolis ĉirkaŭ la tabloj en amikeca etoso.

Samvespere en la kulturcentro okazis ekspozicioj pri manlaboraĵoj kaj artaĵoj. Estis venditaj lokaj produktoj. Elstare bela estis la sceno pri la laborkondiĉoj de kamparanoj dum somera fojnrinkoltado. La sceno kon-



sistis el pupoj vestitaj laŭ la modo de la pasinta jarcento en orienta Finnlando, ree kreitaj laŭskalaj pejzaĝo kun veraj bonodora fojno kaj fojnejo, kafujoj, manĝaĵoj kiaj salitaj koregonetoj, sekala kaj trika panoj k.a.

Amuze estis, ke apud la kampo staris ferianta urbana pupofamilio tute alie vestita, mirante la kamparanojn. Sur la kresto de la fojnejo kuŝis malgranda feo, preskaŭ kaŝita de ligna likeno, kaj supervizis ĉion. Apude estis haveblaj poemetoj pri la pasintaj viveroj kaj en la finna kaj en Esperanto. En alia loko staris fotoekspozicio pri la koboldopupoj Anselmo kaj Elvira, kun rimajoj en Esperanto kaj la finna.

En la kulturcentro okazis ankaŭ koncerto de la katalunaj/esperantistaj gitaristoj Joan Rafòls kaj Miguel Rodríguez. Aldone estis montrataj pup teatraĵo Raudanlukko al infanoj, popoldancoj kaj popolaj kostumoj kaj kostumoj kreitaj laŭ tre antikvaj trovitaĵoj (muinaispuku). La ĝemelsocietoj de pluraj landoj deĵoris ĉe siaj budoj kun reklametoj kaj vendotaĵoj.

Sabate la seminarianoj aŭskultis prelegon de d-rino pentristino Helenä Rytkönen el Germanio pri la universala koncepto pri naturspiritoj. La prelegon plivigligis dia-pozitivoj. Poste komenciĝis aŭtobusa ekskurso al koboldejoj, kie la ekskursanoj aŭdis rakontojn pri koboldaĵoj kaj misteraj okazintaĵoj. Malgraŭ la daŭra pluvo ili vizitis

ankaŭ malnovan kuracan banejon Runni kaj ne-plu-uzatajn fojnejojn, kie ili vidis kelkajn artaĵojn de la vilaĝanoj. Ili ne povis ne pensi pri la malfacilaĵoj de la kamparanoj en regiono, kie oni luktas kaj strebas por povi daŭre vivi en la geava regiono. Unu fojnejo estis "meblita" per pajlaĵoj kiel preĝejo kaj some-re tie estis okazinta diservo. En alia fojnejo estis okazinta nokta kamparana balo. En tria fojnejo kuŝis senkapa laca bienulino en gumobotoj kaj kruroj el ligno.

Ĝuste antaŭ la sunsubiro la aŭtobuso haltis ĉe malnova bienego, kie atendis vespermanĝo el tradiciaj finnaj pladoj, kiel ekz. raposupo, frititaj koregonetoj kaj dolĉa fromaĝo bakita en forno el la lakto de ĵusnas-kinta bovino, kamemoroj kaj oksikokoj. Surtable videblis kortuŝaj hejmaj antikvaĵoj. La kelnerinoj surhavis verdajn malpezajn surtutojn, kio igis ilin aspekti kiel arbarfeinoj, kaj tra la malnovaj fenestroj oni vidis flaviĝantajn foliarbojn en ora vesperlumo. Ĉie brulis kandeloj kaj lanternoj.

La ekskursanoj reiris al Iisalmi malfrue en la nokto, kaj la aŭtobuso veturis preskaŭ senlume sub la pristeliĝanta ĉielo kaj multkoloraj nuboj. Sur iu lagobordo brulis adiaŭa fajrego.

Malgraŭ la malalta nombro de la partoprenantoj la kobolda seminario de Iisalmi estis rimarkinde bone priatentita en regionaj kaj lokaj gazetoj.

Saliko

Korespondi deziras

Mi volas korespondi kun esperantistoj el diversaj landoj pri ĉiuj temoj. Mi ŝatas kolekti poŝtkartojn kaj -markojn kaj monerojn,

monbiletojn. Mi volas interŝanĝi kun esperantistoj.

Wei Jianhua, P.O. Box 3, CN-063000
Tangshan, Ĉinio

Ĉiuj kune por kio?

Ĉiuj kune. Aktoj de la 1-a Kunsido de la Strategia Forumo de la Esperanto-komunumo. Montpeliero, 2 aŭgusto 1998. Rotterdam: UEA, 1999.

”Ĉiuj kune” nomiĝas esperantlingva dokumento numero 35. Ne temas pri kutima Esperanto-dokumento, sed pri raporto pri kunsido de la unua Strategia Forumo de Esperanto-komunumo, kiu okazis dum Universala Kongreso en Montpeliero 1998.

Esperanto-komunumo estas plurfaceta kaj ĝis nun ofte mankis ligoj aŭ diskutado inter la diversaj grupoj de tiu komunumo. La unuan strategian forumon partoprenis (almenaŭ aliĝis) 66 diversaj organizoj kun plej politikaj kaj movadaj perspektivoj. Partoprenis esperantaj komunistoj, katolikoj, samseksemuloj, nefumantoj, amikoj de saŭno, sed ankaŭ UEA, SAT kaj OSIEK. Eble la sola ideologia grupo de Esperanto-komunumo, kiu ne partoprenis estis tiu ĉirkaŭ Literatura Foiro, Esperanta PEN-klubo kaj ”raŭmismo”.

La libreto prezentas enkondukajn prelegojn de Renato Corsetti, Lee Chong-Yeong, Humphrey Tonkin, Yves Peyraut kaj Aleksandr Korĵenkov. El ili ĉiuj krom Yves Peyraut (reprezentanto de SAT) reprezentas pli-malpli la UEA-esperantismon, kaj la aranĝo rilatas proksime al la Kampanjo 2000 de UEA, kvankam Corsetti emfazas ke ne temas pri io de UEA kaj ĝiaj kunlaborantaj organizoj. La Strategia Forumo strebas al i.a. ”ekumenismo” ene de Esperantomovado. Oni ne akceptis ian ajn deklaron, manifeston aŭ alian dokumenton. La sola konkludo estis la bonvenigo al kunlaboro kun aliaj asocioj.

La publikigitaj prelegoj ofertas materialon por plua pensado kaj diskutado pri la celoj kaj ecoj de Esperanta movado. Tonkin analizas la diversajn difinojn de Esperanto-parolantaro, movado,

komunumo kaj civito, kaj trovas pravecon en ĉiuj el ili. Malgraŭ diversaj difinoj kaj opinioj necesus kunlaboro kaj laŭ Tonkin al Esperanto-uzantoj necesas lerni bazajn regulojn de interpersona konduto kaj agi laŭ ili, lerni minimuman humilon kaj ĉesi personajn atakojn en parodioj, ŝlosilaj romanoj kaj cirkuleroj. Necesas turniĝi for de la fermita cirklo de propra orĝojlo kaj malfermiĝi eksteren. Laŭ Tonkin ne eblas ignori la fundamente humanismajn nociojn, kiuj troviĝas ĉe Esperanto: ”la Esperanta ideo (...) enhavas certan moralan vizion de nova etiko de internacia komunikado”. Peyraut kaj Korĵenkov same alvokas la pli aktivan partoprenon de Esperanta komunumo/movado al aferoj de la ekstera socio, kiu estas, ankaŭ laŭ publikaj paroloj de Berlina UK kreskanta tendenco de Esperanto-movado, almenaŭ la movado ĉirkaŭ UEA. La celo de la movado ne estas ĉion ŝanĝi en la mondo, sed aktivi en sia propra kampo, en tiu de lingvoj. Laŭ Peyraut ”la nocio de internacia lingvo estas revolucia faktoro en si mem” kaj ĝi ”kontraŭas la nunan staton de la homa socio”. Korĵenkov emas plu ”ligi la imagon pri Esperanto kun alternativa viv-modelo de materiala ŝparemo, neperforto kaj toleremo”. Toleremo kaj kunlaboro gravas ”ne nur en la granda mondo sed ankaŭ en nia negranda parolkomunumo.”

Materialoj de ”Ĉiuj kune” en si mem, aŭ kune kun diskutkajeroj de UEA (Korĵenkov: ”Esperanto post la jaro 2000” kaj Bociot: La spirito de Esperanto kaj la ”samideanaj” malamikaĵoj) donas bonan bildon pri la nuna diskutado pri la celoj kaj strategio ene de Esperantomovado (kaj ne nur ĉirkaŭ UEA) kaj ofertas bazon por plua diskutado. La diskutoj daŭris en la dua strategia forumo dum la Berlina UK. Espereble io simila rezultos post ĝi.

Jukka Pietiläinen

Marjatta Rautio: mia esperanta patrino

La 28-an de septembro forpasis Marjatta Rautio. Mi ne kapablas memore skribi pri ŝia “oficiala esperanta kariero”, sed en mia esperanta vivo ŝi havis la ĉefrolon.

Kiel 10-jara infano mi hazarde komencis lerni Esperanton, unue sola, hejme. Tiutempe la laborista instituto akceptis nur lernantojn pli ol 16-jarajn. Feliĉe la instruisto akceptis min private, hejme ĉe si. Verŝajne 10-jara infano estis interesa kuriozaĵo kaj defio por instruisto. La instruisto estis Marjatta Rautio. Dum 6-7 jaroj mi ĉiun aŭ ĉiun duan lundvesperon vizitis Marjatta por lerni Esperanton. Bonege mi memoras la infanaĝan impreson pri ŝia hejmo: grandaj, altaj preskaŭ salonecaj ĉambroj, gigantaj, antikvaj mebloj, pezaj skribotabloj, serpentuma librobretaro. Por la infano la loĝejo ŝajnis senfina ĉambra labirinto kaj havis ion alloge misteran. Foje ni ekzercis en manĝsalono, alifoje en hejma biblioteko, iam en kuirejo.

Marjatta instruis vigle kaj efike. Ni multe ridis dum la lecionoj. Ni konsumis amase da papero. Ŝi uzis malhelbluan tuĉon por skribi novajn vortojn, sufiksojn kaj por desegni. Ĉeffiguro de niaj lecionoj estis blua kapo de Pedro, kun ridanta buŝo kaj pinta ĉapo. Desegnante Pedron Marjatta ĉiam eĉ pli ridis. Pedro ĝojis kaj malĝojis, varmigis saŭnon kaj mem varmiĝis en la saŭno, plenigis tason kaj plenumis promeson. Ankoraŭ post tiom da jaroj tiuj blutuĉaj desegnaĵoj loĝas miamense. Kaj mi rimarkas, ke senvole, senkonscie mi uzas la samajn ekzemplojn, la saman Pedron dum miaj lecionoj.

Marjatta estis ĉiam ĝoja kaj inspira instruisto. Eĉ se pluvegis kaj foje estis iomete tede marŝi haltejen tra la pluvo por lerni Esperanton, la etoso ĉiam gajiĝis ĉe ŝia skribotablo. Ŝi estis ankaŭ postulema instruisto. Se mi maldiligente ripetis la jam lernitan, se mi forgesis vorton aŭ

la diferencon inter du sufiksoj, tuj aŭdeblis “Hontu!”. Sed dumriproĉe ŝi ĉiam ridis.

Marjatta ne nur instruis la lingvon, sed prezentis al mi diversajn erojn de esperanta kulturo kaj movado, sed neniam fanatike. Estis memkompreneblaĵo por ŝi, ke kulturo kaj lingvo estas nedisigebla paro. Mi memoras, ke dum la lecionoj mi aŭdis pri ne nur Zamenhof, sed pri Kabe, Edmond Privat, Kaloscaj, Baghy, UEA, SAT... Ni legis Monaton kaj El popola Ĉinio-n, en antaŭkristnaskaj lecionoj ni kune kantis “Estas porkidoj ni de panjo...”. Marjatta bonege kantis. Por ŝi muziko tre gravis.

Marjatta rakontis al mi pri kongresoj kaj ĉiam kunportis por mi fascinantan donaceton de la kongresaj vojaĝoj al plej diversaj mondopartoj. Ankoraŭ mi havas porinfanan memorludon de ŝi por lerni bestonomojn. Ŝi ankaŭ donacis al mi mian tute unuan esperantlingvan bildlibron “Konstrui novan ponton”, samkiel la unuan poemaron “La ora duopo” de Baghy kaj Kaloscaj. Eĉ poemojn ni kune legis! Eble mi ne tiam bone komprenis la valoron de informoj pri Baghy aŭ Kabe aŭ UEA, al mi eble sufiĉintus la tabelvortoj. Sed sendube mi nun komprenas, kian firmegan ne nur lingvan, sed kulturan kaj movadan bazon ŝi donacis al mi.

Mi admiregis Marjatta. Personon, kiu tiom fluis ajnlingve, esperante, angle, france, ruse... Personon, kiu tiom sciis pri muziko kaj literaturo, kvazaŭ Tolstoj estintus ŝia persona amiko, kaj kiu posedis tiom da libroj. Iel la tuta mondo ŝajnis flui en la hejmon de Marjatta.

Mi nun konscias, ke ŝi estas persono, kiu plej influis mian postan karierlekton (lingvoj) kaj kiu sendube donis la mi senfinan entuziasmecon al Esperanto. Ŝi estas mia esperanta patrino.

Riitta Hämäläinen

Esperantokurso en Taivalkoski

Dum la semajfino 4.-5.9.1999 okazis en Metsäkylä, Taivalkoski intensa Esperantokurso, kiun partoprenis 13 lernemuloj (vd. foton sube). La plej junaj havis proksimume 10 jarojn kaj studis apud siaj patrinoj, la plej maljuna havis pli ol 60 jaroj kaj konatiĝis kun Esperanto helpate de sia filino. La 16-horan kurson organizis la vilaĝanoj kune kun la regiona Kansalaisopisto, kiel instruiston ili dungis R. Pyhälä. La kursanoj nun intencas daŭrigi aŭtodidakte kaj ankaŭ esperas ekhavi korespondantojn. La kontaktadreso de unu el la patrinoj: Aira Tauriainen, Partasentie 19, 93590 Vanhala, Finnlando. La kursanoj ĝoje surpriziĝis pri la universala

atento kiun ili vekis ekz. en ret-info, per kiu venis pluraj gratulaj kaj kuraĝigaj mesaĝoj. Ili kore dankas ĉiujn.

Sukcesa ekspozicio en Vammala 2.-3.7.

La Esperanto-ekspozicio kadre de Tagoj de la malnova literaturo en Vammala bone sukcesis. La standon de EAF vizitis pluraj dekoj da interesitoj, kiuj volis scii pri Esperanto kaj ties literaturo, diskuti pri lingvaj aferoj aŭ aĉeti librojn. Konklude la aranĝo estas certe partopreninda kvankam eble ne ĉiujare. Dankon pro la kunlaboro al Jussi Jäntti, Jorma Toropainen, Markku Saastamoinen kaj Terhi Laaksonen.

Jukka Laaksonen



Esperanto en finna teatraĵo

En Turkuo premieros la 16-an de oktobro porinfana teatraĵo “Läntisen kadun Zorro” de teatra grupo “Teatteri Kolmas Pyörä”. La teatra grupo volis spici sian pecon per Esperanto. En la teatraĵo aventuros Mikko, tre inteligenta knabo, kiu interesiĝas pri plej diversaj aferoj. Li i.a. scipovas kanti “Paljon onnea vaan/ Bondezirojn al vi” esperante. Siajn esperantaj bondezirojn surscenejajn Mikko adresas al brokantisto Harvi Keitele.

Studia Europaea

Yleisradion Opetusohjelmien järjestämässä, Euroopan kielioloja esittelevässä Studia Europaea-esitelmäsarjassa on 13.11.1999 klo 12.00 TV 1:ssä professori Fred Karlssonin esitelmä Maailmankielen ongelma. Studia Europaea-esitelmäsarja esitetään 23.10, 30.10, 6.11, 13.11, 20.11 ja 27.11 klo 12.00 TV 1:ssä.

Fotokonkurso

Post la pasintjara sukceso (40 fotoj de 15 homoj el 9 landoj) la redakcio de La Ondo de Esperanto kaj Urala Esperantista Societo duafoje invitas al fotokonkurso. Fotoj ne jam publikigitaj, kun ajna temo, min. 10 x 15 cm – maksimume 3 de unu persono, en po 1 ekzemplero, subskribitaj per pseŭdonimo kaj akompanataj de identec-indikoj en aparta koverto – atingu, antaŭ 15.12. la adreso de La Ondo, RU-620077, Jekaterinburg-77, p.k. 67 Ruslando. Povos esti premiitaj tri konkursaĵoj, per mono kaj/aŭ abono de La Ondo. Krome libro premios la plej bonan bildon ligitan kun Esperanto.

(*Revuo Esperanto*)

Internacia Festivalo

Saksan Westfalenissa järjestetään 27.12.1999–3.1.2000 keski-ikäisille ja nuorille perheille lapsineen Kansainvälinen festivaali. Tule viettämään vuosituhannen vaihdetta Münsteriin! Lisätietoja saa Hans-Dieter Platzilta, os. Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Deutschland. Internet-osoitteesta: <http://www.quicknet.se/home/q-111060/intfest.htm> kiinnostuneet löytävät vaivattomimmin tietoja festivaalista.

Indiĝenaj dialogoj

Monet maailman alkuperäiskansoista ovat uhattuina. Esperantisteina pidämme heidän säilymistään tärkeänä, kielellisiin ihmisoi-keuksiin vedoten. Juuri pyrkimyksessä alkuperäiskansojen kulttuurin ja kielen säilyttämiseen ovat esperanton parhaat puolet tulleet esille.

Indiĝenaj Dialogoj on projekti, joka tähtää esperanton sujuvaan puhumiseen ja kirjoittamiseen, sähköpostin ja Indiĝenaj Dialogoj-kotisivun tehokkaaseen käyttämiseen sekä näiden taitojen viemiseen alkuperäiskansojen järjestöjen käyttöön. Indiĝenaj Dialogoj pyrkii valmentamaan 250 edustajaa vuoteen 2005 mennessä.

Indiĝenaj Dialogoj etsii vapaaehtoisia tekemään työtä alkuperäiskansojen valmentamisen hyväksi. Ensimmäinen kurssi alkupe- räiskansojen edustajille oli 29.8–19.9.1999. Kurssille osallistui yhteensä 22 henkilöä seuraavista maista: Papua-Uusi-Guinea, Marokko, Ruanda, Burkina Faso, Alaska, Venäjä, Costa Rica, Guatemala, Chile ja Intia. Jos tämänkaltainen esperantotoiminta kiinnostaa, ota yhteyttä Katalin Smideliusiin, s-postios. smidik@bdtf.hu

Kotisivu: <http://www.xs4all.nl/pilger/id/>



Barbara Cvetkova (1910-1999)

Honora Membro de UEA ekde 1995, dojeno de la ruslanda Esperanto-movado, forpasis la 13-an de aŭgusto en Peterburgo, kie ŝi naskiĝis la 4-an de majo 1910.

Esperantisto ekde 1928, ŝi korespondadis kun eksterlandanoj ĝis la Stalina malpermeso. Post jardekoj da deviga pasiveco, ŝi sukcesis partopreni la Vienan UK (1970) dank' al invito de ŝia unua leteramiko el Aŭstrio, rekontaktinta ŝin post tiom da jaroj.

De centoj da esperantistoj ŝi estis konata kaj amata ne pro meritoj literaturaj aŭ movadestraj, sed pro ŝiaj grandanimeco, komprenemo kaj helpemo. Tiun helpemon kaj grandanimecon povis senti ankaŭ pluraj finnlandaj esperantistoj kaj ŝi havas multajn amikojn ĉi-tie. Dum pli ol kvar jardekoj "onklino Barbara" (kun la filino Valeria) gvidis en Leningrado/Peterburgo ekskursojn, akceptis gastojn kaj ĉiel helpis esperantistojn el aliaj urboj.

(Revuo Esperanto)

Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon Aimo Rantaselle, PL 2, 40801 Vaajakoski, s-posti esperantolehti@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- ♦ Helsingissä: Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☒ [Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi](mailto:Sakari.Kauppinen@skau.pp.fi)
- ♦ Iisalmessa: Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispohjantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylässä: Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, (Aimo Rantanen) PL 2, 40801 Vaajakoski ☎ (014) 261 438 ☒ esperantolehti@esperanto.fi
- ♦ Lahdessa: Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ☒ martti.pennanen@pp.phnet.fi
- ♦ Mikkelissä: Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkeli, (Elli Husso) Porrassalmencatu 27 B 51, 50100 Mikkeli.
- ♦ Oulussa: Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ♦ Salossa: Salon Esperantokerho / Esperanto-klubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☒ matti.wallius@pp.inet.fi
- ♦ Tampereella: Esperantoseura Antaŭen / Esperantosocieto Antaŭen, (Jukka Laaksonen) Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (050) 5829 248 ☒ laakju@koti.tpo.fi
- ♦ Turussa: Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☒ tiina.oittinen@orion.fi
- ♦ Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan "esperantoryhmä", jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogruppo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Estraro kunvenis

La estraro de EAF kunvenis la 21-an de aŭgusto en Tampere. Ĉeestis ĉiuj estraranoj krom Jussi Jäntti kaj Kimmo Hakala. Krome parton de la kunsido ĉeestis Jouko Lindstedt.

La prezidanto rakontis pri la Universala Kongreso en Berlino kaj pri la vojaĝo tien. La prezidanto informis, ke dum la tagoj de la malnova libro en Vammala komence de julio multaj interesiĝis pri Esperanto. Du taivalkoski-anoj partoprenis Esperanto-kurson en Tampere kaj Esperanto fariĝas parto de vilaĝa projekto tie.

La sekretario raportis, ke en financoj de la asocio ne okazis multo dum somero. Necesus, ke la kluboj jam pagu siajn kotizojn por tiu ĉi jaro. La estraro decidis pagi la kotizon de Eŭropa Esperanto-unio kiu restis nepagita dum du jaroj.

La estraro konstatis, ke la preparado de Aŭtunaj tagoj en insularo bone progresas. Estis faritaj ofertopetoj por Vintraj tagoj en Rovaniemi fine de marto 2000, sed mankis respondoj. Estis decidita havi someran kurson en Valamo 3-7.7.2000.

La estraro informiĝis, ke necesus ŝanĝi la ejon de la Kultura Esperanto-Festivalo 2000 kaj pro tio ankaŭ la tempon. Kunsido de KEF-temao okazis post la estrarkunsido en Tampere.

La estraro diskutis pri la TTT-paĝoj de la asocio kaj proponis kelkajn ŝanĝojn en ili. Necesus mendilo per kiu eblus mendi varojn de EAF.

La estraro diskutis pri la kontaktado kun eŭro-parlamentanoj kaj decidis, ke Jukka Pietiläinen faru tekston de la letero kaj petu komentojn de la aliaj. En aprilo-majo 2000 okazos Eŭropa

Esperanto-kongreso en Oostende, Belgio kun ekskurso al eŭroparlamento, eventuale eblus kontakti finnajn eŭroparlamentanojn ankaŭ tiam.

La estraro decidis organizi seminarion pri informado kaj konstatis, ke necesus plano pri la celoj kaj praktikaj ebloj pri informado. Informa fako de ELNA havas materialon kiu estas sendota al la estraranoj.

Jouko Lindstedt rakontis pri la laboro de la vortara laborgrupo kaj informis, ke la laboro povus esti preta post ses jaroj. La estraro komentis la proponon pri kontrakto inter la redakcio de la vortaro kaj EAF kaj proponis kelkajn ŝanĝojn. La subskribota versio de la kontrakto estas farita poste.

La sekva kunsido de la estraro okazos la 9-an de oktobro en Helsinki.

Esperantosocieto Antaŭen

Aŭtunaj klubvesperoj estas en la klubejo NESTO Satakunnankatu 30 C 6. La vesperoj okazas lunde kaj komenciĝas je la 17a. La enirejaj pordoj fermiĝas aŭtomate precize je la 17a tial bonvolu veni iomete pli frue. En klubvesperoj ni servas kafon aŭ teon, kostas minimume 5 FIM.

6.9. *Septembra vespero.* Aŭtuna tempo komenciĝas kun memoradoj de someraj vojaĝoj, kursoj kaj kongresoj per vortoj kaj bildoj.

3.10. Kongifoiro en la korto de Finlayson en dimanĉo je la 10–16.

4.10. *Oktobra vespero.* Raita Pyhälä vizitas kaj rakontas pri sia vojaĝo en Francio.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- ♦ Suomen opettajien esperantoliitto, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ✉ raita.pyhala@lesti.kpnet.fi ☎ (06) 8637 351
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki

- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ✉ Ritva.Sabelli@sfs.fi, ☎ (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakuksanan “Esperanto” kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

5-a Internacia Esperanto-semajno en Tampere.

Respondeculoj de la kursoj:

Katalin Smidéliusz, instruisto.

Sylvia Hämäläinen, organizanto.

Raita Pyhälä, instruisto.

Foto: Veli Hämäläinen.



1.11. Novembra vespero. Studvespero. Ĉu vi komprenas parolatan Esperanton. Sylvia.

15.11. Elektokunveno. Ni faras agadplanon por la jaro 2000 kaj elektos personojn kiuj realigos la planon. Ĉiuj membroj bonvolu kaj venu doni vian forton por nia agado.

13.12. Decembra vespero. Zamenhof-vespero kaj Juleto.

Membroj sekvu "Memorliston" de Aamulehti dimanĉe, ni anoncas se ni ricevas surpriz-vizitantojn aŭ niaj planoj ŝanĝiĝos.

La E-klubo de Jyväskylä

Ni agotagas 31.10 en Radiokirppari (Radio-pulbazono) en la Foircentro de Jyväskylä

7.11. Raita Pyhälä rakontas pri sia vojaĝo al Francio

21.11. Studrondo Kalevala pli profunde

5.12. Studrondo

12.12. Kristnaska Foiro de organizoj en Hipposhalo

15.12. Zamenhof-festo kaj Et-Kristnasko de la klubo, en la ĉambro Elektroni de Sepänkeskus, la horoj 18–21.

La okazaĵoj en la ĉambro Protoni de Sepänkeskus en Jyväskylä ekde la 14.00 horo, se ne estas alimaniere menciita.

Esperanto-Societo en Turku

Ekspozicio de esperantlingvaj epopeoj okazis en la urba ĉefbiblioteko 30.8–11.9.99. Inter nia fieraĵo Kalevala kaj estona Kalevipoeg estis ankaŭ tiuj unikaĵoj, kiuj ne troviĝas finnlingve, ekzemple Ajnaj Jukaroj, kartvelia Kavaliro en Tigra Felo, portugala La Luzidoj de Camoes, esperanta Poemo de Uttoa de Montagut. Ĉirkaŭ la Ago-tago, komence de oktobro la sama ekspozicio estis prezentita ankaŭ en la biblioteko de Runosmäki.

Kolektante esperantigitajn epopeojn por ekspozicio en la ĉefbiblioteko de Turku mi, Anna-Liisa Ali-Simola, skribis al UEA-delegitoj. Unu el ili estas simpatia irlanda verkistino, Maire Mullarney. Tiutempe, marte, ŝi estis ege okupita pro sia reeldonita verko "Everyone's own language" (Ĉies propra lingvo). La temo, travivaĵoj de la verkistino en Esperantujo, estas tiom alloga, ke leganto neniel volas flankenmeti la libron ne lernante samtempe nian lingvon. ⇨

Blinduloj kongresis "Sub la tilioj" en Berlino

La 65-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) okazis en hotelo *Unter den Linden* en Berlino 25.–31.7.99. La kongreson partoprenis 103 vidhandikapitoj kun akompanantoj el 19 landoj el kvar kontinentoj; el Finnlando 8. Afriko estis reprezentita la unuan fojon. Juna Lazare Hounake el Togolando eĉ vojaĝis sole.

Esperanto kaj kulturo

La temo de IKBE-65 estis "Per Esperanto al kulturo". Altnivelaj prelegoj konatigis nin kun esperantolingva literaturo. Theodor Speckmann prelegis pri Goethe kaj Fontane. Pri Puŝkin parolis Nadja Zukova el Kislovodsk (Kaŭkazio) kaj Otto Prytz prezentis la produktadon de la norvega verkisto Johan Falkenberget, kiu evidentiĝis esti lia paren-

co. Pri taĝika muziko parolis Natalia Kasy-mova. Aliaj prelegoj tuŝis fakajn temojn. Birger Vigger raportis pri la E-arkivo en Stokholmo kaj Raimo Tanskanen prezentis la kulturan servon de la Finna Blindulligo. Arvo Karvinen parolis pri la sociala fonduso de Eŭropa Unio kaj ĝia influo sur akiro de laboro.

Ekzamenoj, laborkunsidoj kaj ekskursoj

Jam kelkfoje blinduloj havis eblecon partopreni internaciajn ekzamenojn de UEA/ILEI dum IKBE. En Berlino ekzameniĝis tri blinduloj. Rob Moerbeek, kiu prizorgas ekzamenojn, plu serĉas taŭgan studmaterialon, precipe pri E-movado. ⇒



Theodor Speckmann prezidis LIBE-kunsidojn. Maldekstre sidas kasisto Jan Verheule el Nederlando kaj dekstre estrarano Raimo Tanskanen. Foto: Ritva Sabelli.

Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) havis du laborkunsidojn. Kiel novan ĝeneralan sekretarion estis elektita Anatolij Masenko el Kislovodsk. Li estas atingebla ankaŭ retroŝte. Plejmulte da diskuto vekis la brajla revuo de LIBE “Esperanta Ligilo”, informado de LIBE kaj supersignoj.

En la fino de 1998 ekestis en Ĉeĥio nova retkonferenco. Ĉi-tiun retroŝtan diskutrondon partoprenas nun 15 blinduloj kaj malfortevidantoj.

Abundan kongresan programon kompletigis koncertoj, kunkantado, busveturado en Berlino, ekskursoj al Potsdam kaj Spreewald. En la kastelo Sanssouci en Potsdam eblis palpi objektojn. En Spreewald ni trank-

vile krozadis en rivera labirinto kaj gustumis kukumojn. Tradukadon spontane kaj bonege faris kongresanoj el Germanio, Nederlando, Norvegio kaj Svislando.

Sekvonta blindula kongreso (IKBE-66) okazos en Bulgario, Plovdiv en la komenco de aŭgusto 2000, se eblas.

IKBE kaj UK kongrue

Dum UK unu blinda kongresano bedaŭris, ke li ne povis partopreni IKBE-n, ĉar kun UK tio postulis tro da tempo. Kial do ne iomete kombini ambaŭ kongresojn? Altnivelaj prelegoj certe allogus ankaŭ aliajn vidantajn kongresanojn. Samtempe LIBE povus levisian profilon.

Ritva Sabelli

La bonkora aŭtoro volis donaci la verkon al mi, sed ĉar mi ne apartenas al la retularo, ŝi retis informe pro tio al Jorma Ahomäki. Baldaŭ Jorma kaj mi konkludis, ke kelkajn verkoekzemplerojn indus disvastigi ankaŭ en Turku. Do mi portis la libron al la urba biblioteko (kie oni tuj akceptis ĝin) kaj al la flankbiblioteko en mia hejmejo. Tie oni skribis la verkotitolon sur proponliston, tio estas por mendi la libron al aliaj flankbibliotekoj.

Jorma peris al unu el la librovendejoj en Hansa-kvartalo kelkajn ekzemplerojn. Ili tuj vendiĝis, eble pro alloga surfenestra reklamo farita de Harri Melasniemi. La vendisto mendis pliajn ekzemplerojn.

Cafetori-renkontiĝoj

Ĉiumerkrede inter la 16.30 kaj 17.30. Tiam eblas babili kun geamikoj, renkonti gastojn kaj aŭdi novaĵojn (kaj klaĉojn) pri Esperantujo.

Ekspozicio de epopeoj en la ĉefbiblioteko de Turku.

Esperanto-klubo de Helsinki aktivas

26.10. Kluba vespero en la oficejo je 18-a horo
20.–21.11. Daŭriga kurso de E-o en Stoa, kunlabore kun la Laborista instituto de Helsinki
23.11. Kluba vespero en la oficejo je 18-a horo

Kelkaj klubanoj planas vojaĝon al la 3a internacia himalaja renkontiĝo 26.2–7.3.2000. Se tio vin interesas bv. konsulti la retpaĝon de Esperanto-klubo de Helsinki aŭ kontaktu al Sakari Kauppinen.



Ne nur pro plezuro

Foje la temo de UK estis toleremo. Tion oni bezonas ĉiam. Ŝajnas, ke nuntempe inter ni mankas la spirito de Esperanto, afableco, kunagadvolemo. Kiel nia agado estas rimarkita ekster la esperantistaro? Ĉu niaj komunaj kunvenoj estas nur pro plezuro?

Novaj esperantistoj ne kreskas aŭtomate. Kiel impresi ilin? Kiel informi, allogi, varbi? Tio bezonas multajn planojn, ideojn, kiel normala movada agado samtempe. Kaj por tio gravas bonetosaj laborkunvenoj. Tamen unu senpripensa frazo povas difekti la etoson, interrompi aŭ tute malhelpi pli multflankan traktadon pri iu ideo. Por ke la kunvenoj restu instigaj, efikaj, bonvolu, aŭdinte ies ideon, eviti tuj diri:

1. *Estas stulte fari tion*

– ĉar dum kelkaj sekundoj vi ne kapablis komplete pensi pri la ideo, eble el aliaj flankoj traktindaj

– ĉar simple tio signifas, ke la proponanto estas stulta, en estonto li/ŝi silentos pri sia malpli stulta ideo

– ĉar post tiu bato la diskuto mortas, neniu ja volas prezenti sin stulta

2. *Almenaŭ mi ne kontribuos*

– ĉar tio signalas: mi ne faras nenion, ankaŭ vi aliaj ne faru ion

3. *Vi proponis, vi faru*

– ĉar tio montras, ke la afero estas nur bagatelaĵo, kiun la proponanto faru sola, ne gravas se malsukcesos, ĉar ne estas mia propono

– ĉar ankaŭ tio signifas al la aliaj: restu for, ne helpu.

Eble tiu, kiu uzis iun el la tri ekzemplaj frazoj, mem eĉ ne perceptis dirinta ion negativan, difektantan la kunvenan etoson. Ju plias tiaj frazoj, des malplias bonaj rezultoj. Por informado oni devus uzi ĉiujn eblojn. Senpaga informo ekzemple en gazeto eblas nur tiam, kiam ni aranĝas ion. Do, ne tre ofte. Kaj nura informo kvankam pri ekspozicio restas preskaŭ vana sen diligenta informdisdonado apud la ekspozicio. Mal-

multekosta informado ekzemple pri E-muziko pere de radiofonio mankas al ni totale, bedaŭrinde.

Kvankam ne estas malbone se en la festkunvenoj ni amuzas nin, tamen almenaŭ tiam, kiam ni bezonas monon por tio, ni ne nur rajtas, sed ankaŭ devas pensi: ĉu tio iel utilas al Esperanto?

A-L A-S

Esperanto en la origina interpaciaga tasko

Ne ofte, sed iam povas al esperantisto okazi, ke Esperanto ludas sian interpacigan rolon, ĉar Zamenhof ne finfine celis sian novan lingvon nur kiel lingvo facillernebla, sed kiel pacportilo inter la nacioj, kiel estas esprimita ankaŭ en la himno “La espero”. Ĉi tio okazis al mi. Kiam mi proksimiĝis al vojkruĉiĝo, tie estis 5-6 knaboj, unu pli malblonda kun biciklo aliaj perpiedaj.

Jam de malproksime mi rimarkis, ke la finnaj 8-10 -aĝaj knaboj havis ŝtonetojn en la mano. Unu direktis sian manon al dorso de malhelhaŭta samaĝa knabo, eble por ĵeti ŝtonon. Mi riproĉis la knabojn, kiuj akuzis la alinacianon pri ŝtonetĵetoj. Mi memorigis la knabojn, ke rasimo estas deliktego, sed ili komencis nur rideti kaj ridi. La situacio solviĝis, ĉar mi parolis pri diverskoloraj floroj, katoj kaj hundoj. Mi zorgis, ke la alinaciulo povis forbicikli.

La biciklanta knabo iris al la sama direkto kiel mi. Kiam li estis eble cent metrojn for de finnaj knaboj, li haltis. Mi iris al li kaj demandis, ĉu li parolas la finnan. Li respondis iom malklare, sed mi komprenis. Mi parolis kun li trankvile. Mi diris, ke ni ĉiuj estas malbonaj. Mi trovis ie reklamfolion pri Esperanto, kiun li akcepte prenis. Li estas el Srilankao. Poste mi pensis pri la bataloj inter tamiloj kaj la ĉefnacionoj.

Pentti Törmälä

Misteraj balonoj sur marĉo

Rememoro el la jaro 1938

Antaŭ 61 jaroj okazis en Kårsämäki (komunumo ĉ. cent km de Oulu suden), nekutima epizodo, kiu vekis grandan miron ne nur en la vilaĝo, sed kaptis atenton ankaŭ ĉe gazetaro. La plej granda tagĵurnalo en Norda Finnlando; Kaleva, en Oulu, publikigis tutaĝan raportaĵojn kun bildoj kaj kun la jena titolo (finningve): “Hollannista Kårsämäelle lentäneet leikkipallot kansainvälisen sensation kohteena”, t.e. en Esperanto “El Nederlando al Kårsämäki flugintaj ludbalonoj kiel objektoj de internacia sensacio”.

Do, pri kio temis? Ni retrospektu ĉi tiun sensacion. La reĝa familio kaj la tuta Nederlando estis en la 31-a de januaro 1938 ĝojigitaj pro naskiĝo de princino, estonta reĝino. La ĵusnaskito ricevis la nomon Beatrix. Por saluti kaj informi pri la ĝoja evento per speciala maniero, lernantinoj, ekzemple el katolika lernejo “De school der Zusters Ursulinen” en la urbo Roermond, suda Nederlando, allasis en aeron amason da balonoj ekipitaj per paperslipetoj, sur kiuj estis skribitaj, nederlandlingve, la mesaĝo pri la naskiĝo de la princino kaj adresoj de la sendintoj. Kaj kio okazis poste. Ni rigardu.


Matene la 7-an de februaro de tiu jaro 1938 filo de forstisto en Kårsämäki iris per ĉevalo kun sledo al fojnstakoj sur marĉo Pöngänneva por transporti de tie fojnon. Skiante akompanis lin najbara viro por gvidi al la ĝusta loko. Meze de la marĉo la ĉevalo subite maltrankviliĝis. La viroj ne tuj komprenis kial, sed baldaŭ ili ekvidis sur la neĝo je distanco de ĉ. 10 m ion ruĝan. La ĉeval-

veturigisto petis la kamaradon skii al la ruĝaĵo por konstati kio ĝi estas. Sed li ne kuraĝis tion fari, ĉar li opiniis, ke ĝi povus esti avertsigno pro tie streĉita kaptilo por vulpo. Tial la ĉevalisto mem saltis en la neĝon, kaj atinginte la strangajon konstatis, ke tio estas du balonoj kunligitaj, unu el ili rompiĝinta. Al la balonoj estis fiksitaj oranĝkoloraj paperaj slipoj kun teksto en iu fremda lingvo.

Revenvoje la viroj kunportis la trovitajn strangajojn al la vilaĝo kaj kompreneble montris kaj rakontis al la familianoj. Neniu komprenis la aferon. Tiam iu proponis montri la misterajn slipojn al la lernejoj instruistoj. Ili ne komprenis pri kio temas. Poste oni portis la slipojn en la apotekon, pensante, ke tie ja troviĝas medikamentoj kun tre strangaj nomoj. Eble tie oni deĉifros la skribaĵon. Sed la enhavo de la slipoj eĉ tie ne klariĝis. Ankoraŭ oni provis ĉe poŝtoŝeĉejo kaj banko. Vane. Finfine iu rimarkis, ke oni sendu la slipojn al la redakcio de gazeto Kaleva en Oulu, kie oni kredeble solvos la problemon. Tiel oni faris.

En la redakcio la afero kvazaŭ nature estis transdonita en la manojn de redaktoro Martti Putaala, esperantisto, konata pro siaj internaciaj kontaktoj. Putaala komprenis, ke la du nederlandaj lernantinoj, kies nomoj kaj adresoj troviĝis en tiu ĉi balonpoŝto, estis senditaj la balonojn el la urbo Roermond, suda Nederlando, por honori la naskiĝon de princino. Tiel la problemo, kaŭzinta multan pri pensadon kaj miradon solviĝis.

*La lernantinoj Mia kaj
Greta van Ass sendis la
balonojn el Roermond.*



La redakcio de Kaleva decidis ĝojigi la sendintojn de la trovitaj balonoj, Mia kaj Greta van Ass en Roermond, per resendo de iliaj adreslipoj, kaj rakonti la historion de la trovo. La nederlandan lingvon neniu el la redakcio scipovis. La germana kaj la angla estintus uzablaj. Sed pro tio ke en la redakcio troviĝis kapabla esperantisto, kiu havis jam sperton en internacia korespondo ĝis malproksimaj landoj, kiel Ĉinio kaj Hindio, la letterskriban taskon oni donis al li, Martti Putaala. Al la letero estis aldonitaj la novaĵo de Kaleva pri la trovo de la balonoj, mapo de Finnlando kun signo pri la situo de Kårsämäki (Mi menciis, ke la rektlinia distanco inter Roermond kaj Kårsämäki estas proks. 1700 km), fotoj kaj bildlibro de Oulu kun aŭtografaj de la redakcianoj kaj iliaj salutvortoj. Tiun ĉi rimarkinde belan kolekton oni adresis al la knabinoj Mia kaj Greta en ilia lernejo en Roermond.

Pasis kelka tempo, kaj la redakcio en sia ordinara urĝa laboro estis jam forgesinta la

“Balonojn de Nederlando”. Sed la afero revekiĝis kiam komencis alvenadi eksterlanda poŝto: leteroj, poŝtkartoj kaj gazetoj nederlandaj raportantaj pri granda interesiĝo vekita de la balona aventuro. Granda amsterdama gazeto De Telegraaf publikigis la novaĵon en kadroj sur la frontapaĝo. Haagse Courant estis trovinta personon scipovanta la finnan lingvon, kiu estis tradukinta el la eltranĉaĵo de Kaleva, sendita al la knabinoj, la novaĵon pri la trovo de la balonoj.

Ankaŭ en Esperantaj gazetoj aperis ĉi-temaj novaĵoj. Sed ne estas menciita unu grava rolulo en tiu ĉi spektaklo, nome la instruistino de la knabinoj Antoinette Franssen. Ŝi skribis leteron la 14-an de marto 1938 al la redakcio de Kaleva. Jen citaĵo el la letero: “Ankaŭ mi dankas vin pro la bela surprizo per via sendaĵo. Sammaniere neniu alia surprizis. Kvankam kelkaj infanoj ricevis leterojn kun iliaj adreslipoj, neniu ricevis tiel belajn donacojn. Ili multe plaĉis ankaŭ al mi pro tio, ke mi antaŭ unu jaro

SOLA, SOLE, SOLECA, NUR?

Yksinäisen kieliongelmia

Sole vai *sola*, siinäpä pulma, kun molemmat suomennetaan ”yksin”. Asiaa voi yrittää selventää näin:

SOLA(j)

Ĉu vi estas sola? Oletko yksin? *Sola* kuvaa subjektia (sinä), sinun olotilaasi.

Ĉu vi estas solaj? Oletteko yksin? (ilman seuraa). *La infanoj petis permeson naĝi solaj*, lapset pyysivät lupaa uida yksin (ilman aikuisia rannalla). *Li sola estas kulpa*. Hän yksin on syyllinen.

La sola lingvo internacia, ainoa kansainvälinen kieli. *La sola filo de Dio*, Jumalan ainokainen poika.

Solfilo, *solfilino* ja *solinfano* eivät ole kaikkien esperantistien mieleen, ja siksi jotkut suosittelevat täyspitkiä muotoja *la sola filo* jne.

SOLE

Anna lernis naĝi sole, Anna oppi uimaan ilman kannatteluapua.

Eva faris la laboron sole, Eva teki työn yksin. *Sole* kuvaa tekemistä, jossa ei ole mukana toisia. On myös sananlasku: *Malfeliĉo malofte venas sole*, onnettomuus tulee harvoin yksin, ja ”ei kaksi kolmanna”.
Katalin Smideliusz ehdotti Tampereen kurssilaisille, että *sole*-sanaa ei käytettäisi merkityksessä ”vain”, vaan siinä käytettäisiin *nur*-sanaa: *Ŝi manĝas nur legomojn*. Hän syö vain vihanneksia.

Älä lue pitemmälle jos pelkää meneväsi sekaisin.

Tässä tulee jo vastaan muut sävyt: ”ainoa(staan)”, ”pelkkä, pelkästään”.

La sola libera seĝo, ainoa vapaa tuoli, ja *Nia ununura leĝo*, ainoa lakimme. *Ununura* ja *sola* ovat samanarvoisia, ja Jumalan poikakin voisi olla *Lia ununura filo*.

NUR

Lauseesta *Li venos nur dimanĉe* voi tulla erimielisyyttä. Tarkoittaako se ”Hän tulee

ekstudis Esperanton kaj nun ni fondis ĉi tie klubon kun 48 membroj kaj kies sekretario mi estas. Do kiel esperantisto mi tre kontent- as, ke ĝuste la infanoj de mia klaso ricevis leteron en Esperanto el Finnlando.”

Ankaŭ la knabinoj Mia kaj Greta dankis per letero la redakcion de Kaleva: “Ni estas tre ĝojaj, ke vi skribis al ni. Estis bela post-tagmezo, kiam la multaj balonoj suprenleviĝis. La libro kaj la gazet-eltranĉaĵoj estis belegaj. Ĉiuj volis vidi la fotojn. Novaĵo


rapide disvastiĝis. En nia gazeto ankaŭ aperis artikoloj, kiujn ni ĉi-kune sendas al vi samkiel fotojn de niaj karaj geprincoj kaj de la princino Beatrix. Multajn dankojn kaj korajn salutojn ankaŭ de niaj gepatroj. Kun granda estimo Mia kaj Greta van Ass.”

Tia estas la memoraĵo de antaŭ 61 jaroj, vera fabelo el la tempo kiam ankoraŭ ne ekzistis la nuna interreto nek komputilo. Ĉu tiuj inventaĵoj flankenpuŝis “balonpoŝton”?

Allan Mehtonen

**Raita Pyhälä
instruas en la
5-a Internacia
E-semajno en
Tampere.**

**Foto: Veli
Hämäläinen.**



vain sunnuntaina” vai ”Hän tulee vasta sunnuntaina”? Tämän selventämiseksi jotkut esperantoniekat ovat keksineet käyttää uudissanaa *erste*.

Li venos erste dimanĉe (vasta sunnuntaina). Voi nähdä sanottavan näinkin: *Li venos maljam dimanĉe*.

Plena Analiza Gramatikon mukaan *nur dimanĉe* = vasta sunnuntaina ja *sole dimanĉe* = vain sunnuntaina. Katalin Smideliusz'n mukaan *nur* = vain.

SOLECA

No, entä sitten ero *soleca* ja *sola*? *Sola* on todella konkreettisesti yksin (ei muita paikalla), mutta *soleca* on tunnekokemus: *Homo ofte sentas sin sola en granda urbo*. Suuressa kaupungissa ihminen usein tuntee itsensä yksinäiseksi. Ja syksyisestä koleasta rannasta voi sanoa: *Sur la bordo estis solece*.

Lisää esimerkkejä: *soleca dometo*, mökki yksinäisellä paikalla, *vivi en plena soleco*, elää yksinäisyydessä, *mi estas soleca kaj*

mizera, tunnen oloni kurjaksi ja yksinäiseksi.

GESOLAJ

Mitä tekevät nainen ja mies yksistään kaksistaan eli *gesolaj*? PIVissä *gesolaj* on leikkimielinen sanonta. *La novedzoj jam deziris resti gesolaj*, morsiuspari halusi jo olla vain kahdestaan. Suomalainen voisi ehkä joskus käyttää tuota nasevaa ilmaisua vastineena sanonnoille ”omassa rauhassa”, ”omissa oloissaan”, porukalla erillään muista.

Tässä pari ajattelemisen arvoista Zamenhofin sananlaskua:

Kun edzo plej malmola estas pli bone ol sola. Kovankin elämäkaverin kanssa on parempi kuin yksin.

Konsoliĝas mizerulo, se li ne estas sola.

Kurjakin saa lohtunsa, jos ei ole yksin eli ”kaksin aina kaunihimpi”.

*erimielisyydet tervetulleita
raita.pyhala@lestijarvi.fi*

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki

Muut lehdet

Orimattilan Sanomissa oli 19.6.1999 juttu Luonto ja kulttuurit kohtaavat Pro Esperarton toiminnassa, jossa esiteltiin Ali-Seppälän tilan toiminta-ajatusta ja kesävieraita Suomesta, Belgiasta, Englannista ja Irlannista. Pro Esperanto -yhdistys on ollut yhteistyössä Kansainvälisen vapaaehtoistyöjärjestön KVT:n kanssa. Yhdistys on saanut kovan anomisen jälkeen myös EU:n leader-rahaa, jolla rakennetaan taideluontopolkua, kunnostetaan saunamökkiä ja ylläpidetään yhdistystoimintaa.

Etelä-Suomen Sanomissa oli 10.8.1999 Börje Erikssonin haastattelu "Esperanto pienin askelin kohti ihmisten ja luonnon tasapainoa". Börje Erikssonin idean mukaan Ali-Seppälän tilasta tulee taide- ja kurssikeskus, jossa kommunikaatio käydään pääasiassa esperantoksi.

Pohjois-Savon kokoomusnuoret ehdottivat Savon Sanomissa, että Euroopan Unionille pitäisi valita yksi yhteinen kieli, latina. Tämä sai helsinkiläisen Markku Korhosen tarttumaan kynään ja laatimaan vastineen, joka julkaistiin Savon Sanomien yleisönosastossa 10.10.1999.

Hän toteaa: "Latinalla on omat historialliset rasitteensa. Mielletäänhän se muun muassa katolisen kirkon kieleksi. Lisäksi se oli aikoinaan roomalaisten valloittajien tunto-merkki". Euroopan yhdentymistä edistäväksi, nationalismia vähentäväksi ja tasa-arvoa lisääväksi kieleksi Markku Korhonen ehdottaa latinan sijasta esperantoa.

Seuraava numero ♦ Venonta Numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Jutut 20.11. mennessä Aimo Rantaselle, PL 2, 40801 Vaajakoski. puh. (014) 261 438. Venonta numero aperos en decembro, artikoloj ĝis 20.11. al Aimo Rantanen, PL 2, FI-40801 Vaajakoski, tel. (014) 261 438.